

Einladung zur Bundesversammlung am 12. Juni 2011

Liebe Mitglieder,
ich lade Sie ganz herzlich zur Bundesversammlung 2011 des Deutschen Esperanto-Bundes e.V. ein, die im Rahmen des gemeinsamen Niederländischen und 88. Deutschen Esperanto-Kongresses über Pfingsten in Münster/Westf. stattfindet.
Ort: Haus Mariengrund, Nünningweg 133, D-48161 Münster, Stadtteil Gievenbeck, Zeit: Sonntag, 12. Juni 2011, ab 9h30

Vorgeschlagene Tagesordnung:

- 1.a) Begrüßung und Eröffnung
 - b) Feststellen der Beschlussfähigkeit
 - c) Genehmigung der Tagesordnung
 - d) Wahl der Protokollanten
 - e) Genehmigung des Protokolls der Bundesversammlung vom 23. Mai 2010 (siehe *Esperanto aktuell* 2010/3, S. 8-10 und 2008/4, S. 10ff)
 2. Berichte der Bundesorgane (Vorstandsbericht, Kassenführung, Rechnungsprüfer)
 3. Entlastung des Vorstands, insbesondere des Schatzmeisters
 4. Wahlen:
 - Wahl eines neuen Vorstands
Der Vorsitzende Dr. Rudolf Fischer und der stellv. Vorsitzende Andreas Emmerich stellen sich zur Wiederwahl. Die weiteren Kandidaten werden im Frühjahr 2011 bekannt gegeben.
 - Wahl der Rechnungsprüfer
 5. Haushaltsplan für 2011
 6. Behandlung von Anträgen. 2 Anträge stellt der Vorstand selbst, siehe rechts.
 7. Ort und Zeit der Bundesversammlung 2013
 8. Verschiedenes
- Ausführliche Unterlagen zu den einzelnen Tagesordnungspunkten werden den Mitgliedern mit den Tagungsunterlagen zur Verfügung gestellt. Weitere Anträge sollen rechtzeitig bei mir eingereicht werden. Soweit sie die Satzung, den Beitrag oder die Auflösung des D.E.B. betreffen, müssen sie mir 3 Monate vor der Bundesversammlung vorliegen. Ich freue mich, Sie in Münster begrüßen zu dürfen.

Dr. Rudolf Fischer
Bundesvorsitzender

Antrag des Vorstandes, die Ortsgruppenförderung ab 2011 neu zu regeln

In seiner Sitzung am 30. Oktober 2010 hat der Vorstand des Deutschen Esperanto-Bundes beschlossen, der Bundesversammlung folgenden Vorschlag für die Neuordnung der Ortsgruppenförderung vorzulegen.

Um die Bezeichnung „anerkannte Ortsgruppe des D.E.B.“ führen zu dürfen, sind folgende Bedingungen ab 2011 notwendig:

- Die Ortsgruppe muss als gemeinnützig anerkannt sein.
- Die Ortsgruppe muss mindestens 5 ordentliche D.E.B./DEJ-Mitglieder haben und insgesamt mindestens 10 Mitglieder umfassen. Nach Anerkennung durch den Vorstand des Deutschen Esperanto-Bundes steht der Ortsgruppe folgende jährliche Förderung zu: 10 EUR pro ordentliches Mitglied nach Stand des Vorjahres. Die Anerkennung ist unbefristet, solange die Bedingungen erfüllt sind und sie nicht von einer Seite aufgekündigt wird. Diese Förderregelung ersetzt die bisherigen individuellen Verträge.

Antrag des Vorstandes, die von einer Europa-Arbeitsgruppe zusammengestellten Sonnenberger Leitsätze zur europäischen Sprachpolitik des D.E.B. zu bestätigen

Sonnenberger Leitsätze zur europäischen Sprachpolitik – Sunmontaj gvidlinioj pri Eŭropa lingvopolitiko

Allgemeine Sprachpolitik

1. Wir unterstützen die Mehrsprachigkeit.
2. Wir setzen uns für eine Erziehung zum Respekt gegenüber allen Sprachen, insbesondere bei Kindern und Jugendlichen, ein.
3. Wir unterstützen Initiativen zur interkulturellen Kommunikation im europäischen Rahmen.
4. Wir sind für eine Sprachpolitik, die nicht zur Verdrängung von Sprachen führt.
5. Wir sind gegen sprachliche Diskriminierung.
6. Wir regen einen EU-weiten zwischenstaatlichen Dialog über Sprachpolitik an.

7. Wir weisen auf den Konflikt zwischen den Empfehlungen der EU und deren Verwirklichung in den Mitgliedsstaaten in Bezug auf sprachliche Regelungen hin.

Esperanto in der EU

1. Wir erwarten eine sachlich begründete Haltung gegenüber Esperanto, insbesondere auch bei Fachleuten und Politikern.
2. Wir glauben, dass Esperanto die Bildung einer europäischen Identität unterstützen kann
3. Wir unterstützen die Idee, die Europa-Hymne auf Esperanto zu singen.
4. Die Erprobung von Esperanto als Arbeitssprache in bestimmten Organen und Einrichtungen der EU ist wünschenswert.
5. Esperanto als Relaisprache im Europäischen Parlament wäre von Vorteil.
6. Wir sehen zur Zeit keine Möglichkeit, dass Esperanto Amtssprache in der EU wird.

Esperanto-Unterricht

1. Wir empfehlen Esperanto als propädeutisches Instrument, um das Erlernen von Fremdsprachen zu unterstützen. Das Erlernen von Esperanto unterstützt sowohl das Erlernen weiterer Fremdsprachen als auch einen tieferen Einblick in die allgemeine Funktion der Sprache, auch der eigenen Muttersprache.
2. Wir empfehlen den Bürgern der EU, Esperanto als eine der zwei Fremdsprachen zu erlernen, deren Erwerb von der Kommission empfohlen wird. Der propädeutische Effekt des Esperanto kann dann den Bürgern die Aneignung von zwei oder mehr Fremdsprachen real möglich machen.
3. Wir empfehlen, Grundlagenwissen über Esperanto in Schulen zu vermitteln.
4. Wir empfehlen die Einführung von Esperanto-Unterricht als fakultatives Angebot an Schulen
5. Wir empfehlen Esperanto-Unterricht an Universitäten, zum Beispiel im Rahmen der Allgemeinen Studien
6. Wir empfehlen, Interlinguistik und Esperanto als Studienobjekte an Universitäten zu behandeln.

Sunmontaj gvidlinioj por Eŭropa lingvopolitiko

Jam delonge Germana Esperanto-Asocio (GEA) sentis la bezonon, havi gvidliniojn pri sia lingvopolitika laboro, precipe kunlabore kun Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) en rilatoj al la politikistoj kaj instancoj de Eŭropa Unio (EU). Antaŭ 30 jaroj multaj Esperantistoj ankoraŭ iom naive atendis, ke la aliĝo de multaj pliaj ŝtatoj al EU konduku aŭtomate al pli granda atento de Esperanto kiel solvo por la komunikada problemo. El tio rezultis ofte nekunordigitaj aktivecoj de unuopaj arduloj, kiuj tamen nur malhelpis al konvene bona renomo de la Lingvo Internacia. Intertempe dominas sobereco pri la ŝancoj de Esperanto en EU. Aliflanke oni klare subtakŝas kaj foje miskomprenas la laboron de EEU nuntempe.

Tial GEA sekvis la inviton de sufiĉe tradici-plena klerigejo, Haus Sonnenberg, en St. Andreasberg, montaro Harz/Germanujo, organizi de la 10a ĝis la 12a de septembro 2010 semajnfinan seminarion pri du temoj: Unue, por eksteruloj: „Ĉu Esperanto kiel pontlingvo en Eŭropa Unio?“, kaj due, por aktivuloj: „Kiuajn gvidliniojn havu nia laboro por Esperanto en EU?“ Per la unua temo GEA esperis, efiki ankaŭ en la ne-Esperantista publiko. Tamen tio tute fiaskis: Eĉ ne unu ne-Esperantisto aliĝis al la seminario, kvankam la klerigejo varbadis kiel kutime.

Por la dua temo GEA invitis s-inon Maja Tišljär, gvidi la kunsidon, enkonduki en la scion pri la organoj de EU kaj ties ebloj, precipe, pri ĉio, kio rilatas al la reguloj de lingvo-uzo, kaj gvidi poste la debaton pri la dezirataj gvidlinioj. Tion ŝi suverene kaj simpatie faris.

Kvankam GEA principe invitis ĉiujn interesatojn kaj logis per apar-

ta subvencio, nur 11 aktivuloj sekvis tiun alvokon. Tamen tiu rondo estis favore miksita laŭ diversaj kriterioj: partoprenis funkciuloj de GEA kaj Germanaj Esperanto-Junularo (GEJ), de la Eŭropa Komisiono de GEA, de „Gesellschaft für Interlinguistik“, de la politikaj Verduloj; sciencistoj, instruistoj, informadikistoj, studentoj, kun plej diversaj spertoj kaj konoj. Komune oni studis la tezojn de pluraj aŭtoroj, kiuj skribe komunikis siajn pensojn pri ebloj kaj febloj de Esperanto en EU.



La kleigejo „Haus Sonnenberg“ en St. Andreasberg.

Regis ĝojinda laborplena etoso, sen flamaj disputoj, sed kun komunanima rezulto, kiun la partoprenantoj provis formuli kaj strukturi al sistemo de gvidlinioj, en diversaj subgrupoj:

- Ĝenerala lingvopolitiko en EU
- Esperanto en EU
- Esperanto-instruado

Certe la gvidlinioj bezonos ankoraŭ pluan poluradon kaj eble tiun aŭ jenan korekton, sed principe la tuto jam taŭgos por trovi konsenton ene de GEA kaj eble pli vaste.

Pro tiu iom provizora (en la Germana formulita) stato mi rezignas tie ĉi, jam malkaŝi pliajn detalojn. La tendenco estas tamen, rezigni utopiajn, laŭleĝe ne realigeblajn postulojn, ekzemple „Esperanto kiel plia oficiala lingvo de EU“ ktp., sed aliflanke

insisti, ke Esperanto trovu la merititan respekton pri siaj kapabloj kaj kulturaj kvalitoj. Kompletigas tion rekomendoj, ekzemple sproni interlingvikajn lekciojn en la universitatoj kaj kursojn tie kaj en lernejoj.

Gravas plie disvastigi la komprenon, ke Esperantistoj ne volas sole politikan progreson de Esperanto, sed – per Esperanto – alstrebas pli altajn celojn, kiel samrajtecon de ĉiuj homoj kaj kulturoj, specife lingvoj. Tial malaperu la miskompreno, ke Esperantistoj celas „senforman kulturkaĉon“, kion neinformitoj foje asertas, sed la idealojn de Eŭropo, ekzemple „unuco en plureco“, ankaŭ en multlingveco. Kaj tia Eŭropo estas por Esperantistoj nur antaŭŝtupo por mondvasta modelo.

Skribe kontribuis al la seminario ankaŭ Seán O’Riain, prezidanto de EEU, per listo de rekomendoj, kiel trakti politikistojn, precipe la Eŭropajn parlamentanojn. Ankaŭ tiu teksto trovis atenton kaj aprobon. GEA nun zorge formulos la gvidliniojn, kune kun klarigaj komentoj, por poste prezenti ilin al pli vasta Esperanta publiko.

Sub la impresoj de tiu sukcesa kaj produktiva semajnfino la ĉeestantoj proponis, ke GEA por aktivuloj de tempo al tempo ree organizu similan semajnfinan seminarion (kaj ree en tiu tre taŭga kaj agrabla klerigejo). Fine la seminario por la GEA-membroj ankaŭ estu ekzemplo, kiel la GEA-estraro estonte uzos la pli altajn membrotizojn por povi elspezi pli da mono por la centraj taskoj de Esperanto-organizo. Venonta seminario sekve traktu la praktikan laboron, per kiu GEA konsekvence apliku la ellaboritajn gvidliniojn.

Rudolf Fischer

El la estraro de Germana Esperanto-Asocio

La estraro de Germana Esperanto-Asocio (GEA) uzis la kunvenon de la landaj ligoj por aparte kunsidi la 30an de oktobro en Herzberg. Rezultis jenaj decidoj:

- GEA petas la Interretan Komisionon (IREK) de Germana Esperanto-Junularo (GEJ), akcepti Jörg Gersonde kiel administranton de la servilo *esperanto.de*. Tiel la aliaj administrantoj, precipe Benedikt Wildenhain, povos ŝpari tempon, kaj GEA ne nur finance, sed ankaŭ organize kontribuos al la komuna laboro de GEJ kaj GEA.
- La jara abono de *Esperanto aktuel* ankaŭ en 2011 kostos plue 18 € por enlandanoj, 24 € por ekspedado al eksterlando. Nur interŝanĝ-ekzempleroj estos estonte ankoraŭ paperaj, t.e. tiuj landaj ligoj, kiuj siavice ne sendadas paperan ekzempleron de sia revuo (plusendotan al la Esperanto-biblioteko en Aalen), ricevos estonte nur elektronikajn versiojn.
- La kandidatoj por la nova GEA-estraro ekde 2011 ankoraŭ ne estas ĉiuj trovitaj. Gravas tamen, ke kaj la prezidanto Rudolf Fischer kaj la vicprezidanto Andreas Emmerich pretas al plia deĵorperiodo de 2011 ĝis 2013. En 2013 definitive devos esti trovata posteulo por la nuna prezidanto.

La estraro pritraktis krome du proponojn al la membrokunveno pentekoste en Münster. Vidu la apartan inviton.

Rudolf Fischer

Berichtigung

Der Vorsitzende der Nürnberger Gruppe ist Helmut Sebastian. In *Esperanto aktuel* 2010/5 wurde in dem Beitrag „Ido-Kongress in Tübingen“ irrtümlich ein anderer Name genannt. *red.*

D.E.B.-Wochenende für Aktive

Herzberg • 19 Aktive aus den Landesverbänden und dem Bundesvorstand kamen vom 29. Oktober bis 31. Oktober zum diesjährigen Arbeitswochenende in Herzberg am Harz zusammen.



Zu Beginn des Treffens informierten Szófia Kóródy und Peter Zilvar über die aktuellen Projekte der Esperanto-Stadt. Der Samstagmorgen war dem neuen Mitgliederverwaltungssystem iDiS gewidmet. Der D.E.B.-Vorsitzende Dr. Rudolf Fischer stellte das dezentrale Verwaltungssystem online vor. Anschließend hatten die Anwesenden Gelegenheit, den Umgang mit dem System im Netz zu üben.

Am Nachmittag besichtigten die Anwesenden unter Leitung von Peter Zilver das Schloss-Museum. Die neue „Esperanto-Plattform“ stand im Mittelpunkt des Besuches.

Anschließend stellte Wolfgang Bohr die „Sonnenberger Leitsätze des D.E.B. zur europäischen Sprachpolitik“ vor. Die Anwesenden diskutierten die Leitsätze zur allgemeinen Sprachpolitik, Esperanto in der EU und dem Esperanto-Unterricht intensiv. Man war sich einig darüber, dass diese Leitsätze, die im September 2010 im nahegelegenen Internationalen Haus Sonnenberg zu St. Andreasberg/Harz erarbeitet wurden, eine große Hilfe in der Argumentation für Esperanto auf europäischem Niveau darstellen und dass jeder, der auf diesem Feld aktiv ist, sich mit diesen Leitsätzen auseinander setzen sollte. Zur Zeit werden die einzelnen Leitsätze mit Kommentaren versehen und sollen dann bei Deutschen Kongress in Münster den Mitgliedern zur breiten Diskussion vorgelegt werden.

Es folgten die Berichte der Vertreter der einzelnen Landesverbände. Leider waren einige Bundesländer, die in den letzten Jahren an diesem Wochenende aktiv teilnahmen, in diesem Jahr nicht anwesend. Über die Vorbereitungsarbeiten für den gemeinsamen niederländisch-deutschen Kongress, der über Pfingsten 2011 in Münster stattfinden wird, berichtete Dr. Rudolf Fischer. Er unterstrich, dass die preiswerten Übernachtungsmöglichkeiten im Tagungshaus begrenzt sind. Eine frühe Anmeldung sei daher sinnvoll.

Für 2012 lädt der Landesverband Berlin-Brandenburg zum gemeinsamen polnisch-deutschen Kongress nach Berlin ein. Der Kongress im darauf folgenden Jahr soll in Nürnberg stattfinden.

Die Veranstaltung endete am Sonntag mit einer Sammlung von Ideen zum Thema „Intensivierung der Öffentlichkeitsarbeit des D.E.B.“. Besondere Bedeutung wurde den Aktivitäten im Jubiläumsjahr 2012 beigemessen. In diesem Jahr wird Esperanto 125 Jahre alt. Eine Vorbereitungskommission, welche die verschiedenen Aktivitäten im Jubiläumsjahr koordinieren soll, wurde benannt.

Die Anwesenden kamen überein, sich im Jahr 2011 vom 28. bis 30. Oktober wieder in der Esperanto-Stadt zu treffen. Zentrales Thema werden dann die Aktivitäten im Jubiläumsjahr sein.

Wolfgang Bohr

Vorstandsmitglied der Landesverbände



Multflanka agado en malgranda lando

La ĉeĥa Esperanto-movado konsistas el pluraj sendependaj organizaĵoj, kiuj bone kaj harmonie kunlaboras. Mi do ĉi tie strebos prezenti al vi koncize ĉiujn (almenaŭ tiujn al mi konatajn) kun prezento de iliaj ĉefaj agadoj.

Sendube la plej grava kaj ankaŭ la plej multnombra estas Ĉeĥa Esperanto-Asocio (ĈEA). Ĝi konsistas el individuaj membroj, tamen ene de ĝi laboras kaj lokaj kluboj de Esperanto, kaj kelkaj fakaj sekcioj. Ĝi ankaŭ eldonas kvarfoje jare presitan organon *Starto* kaj ne-regule (laŭbezone) *ĈEA-retkomunikoj* (kiuj estas senpage sendataj al ĉiuj interesatoj, ne nur al la membroj, ankaŭ eksterlandaj). ĈEA mastrumas proprajn bibliotekon kaj libroservon proponante literaturon en Esperanto al siaj membroj, organizas ĉiun trian jaron kongreson, en kiu estas interalie elektata nova komitato de ĈEA, kaj en la jaroj inter la kongresoj organizas konferencojn kun simile riĉa programo, krom la balotoj.

Inter la aktivecoj de ĈEA menciindas ankaŭ aparta okupiĝo pri komputila klerigado de la membraro, kontribuado al Vikipedio, komputila prilaboro de historio de la enlanda movado, ciferecigado de Esperanto-literaturo kaj kantotekstoj, kreado de plurkomunikilaj dokumentoj en Esperanto kaj esperantigado de oficialaj urbaj kaj turismaj retejoj (ĝis nun 15 – en tiu fako plej verŝajne Ĉeĥio okupas la unuan lokon en la mondo).

ĈEA estas kolektiva membro de Universala Esperanto-Asocio (ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio estas Lucie Karešová, komitatano A por Ĉeĥio Libuše Hýblová), sed ankaŭ de Eŭropa Esperanto-Unio (assembleano Petro Chrdle). La sekcioj de ĈEA estas samtempe ĉeĥaj sekcioj de koncernaj internaciaj Esperanto-asocioj: pedagogia sekcio agas ene de ILEI, sekcio de nevidantoj ene de LIBE, katolika sekcio ene de IKUE kaj kristana sekcio

ene de KELI.

La nuna komitato de ĈEA estas prezidanto Jana Melichárková, vicprezidantoj Jiří Tomeček kaj Petro Chrdle, prezidanto de Kontrola grupo Libuše Dvořáková, sekretario Pavel Polnický kaj la komitat-membroj Libuše Hýblová, Pavla Dvořáková kaj Miroslav Malovec.

Ĉeĥa Esperanto-Junularo: La junulara Esperanto-movado tradicie ludas gravan rolon en Ĉeĥio. Tuj dum sia fondiĝo la nuna ĈEA kreis junularan sekcion, kiu estis eĉ bone reprezentita en la komitato de TEJO. Ĝia agado estis riĉa, tamen la junaj esperantistoj forgesis pri la necesa varbado inter eĉ pli junaj. Do post kiam la kerno de la membroj de la junulara sekcio en la naŭdekaj jaroj transiris la aĝlimon, la sekcio devis esti nuligita. Sed venis novaj aktivaj junuloj, kiuj lernis Esperanton plejparte per Interreto, kaj en junio 2005 ili fondis junularan asocion, ĉi-foje jure memstaran, kun la nomo Ĉeĥa Esperanto-Junularo (ĈEJ). Nun en ĝi membras proksimume 100 junuloj, ĝi estas kolektiva membro de TEJO kaj vigle aktivas. La plej videbla el la agadoj de ĈEJ estis la organizo de la Internacia Junulara Kongreso en 2009 en Liberec (organizita komune kun GEJ kaj PEJ), kiu altiris en Ĉeĥion 343 junajn esperantistojn el 5 kontinentoj. La fonda prezidanto estas Dagmar Chvátalová, la nuna prezidanto estas Dan Mrázek, la dua prezidanto kaj nuna komitatano de TEJO estas Marek Blahuš.

Krom la menciitaj ĈEA kaj ĈEJ ekzistas en Ĉeĥio ankaŭ aliaj jure memstaraj Esperanto-Asocioj, el kiuj necesas menci iuavice Asocion de Esperantistaj Handikapuloj (AEH), kiu agas plejparte kunlabore kun la Esperanto-Klubo de Stanislav Schulhof en Pardubice kaj havas ankaŭ multajn eksterlandajn membrojn. Ĝi eldonas organon *Informilo* kun ties kompletiga gazeto *Antaŭen* kaj organizas regulajn lingvajn semina-

riojn, kutime dufoje jare tutsemajnan en Skokovy kaj unufoje monate sabatan en Prago. La prezidanto estas Pavel Nechvíle.

Alia menciinda memstara Asocio estas ĈeFEA (Ĉeĥa Fervojista Esperanto-Asocio), kiu origine agis kiel fervojista sekcio de ĈEA kaj jure memstarigis en la jaro 2009. Ĝi estas samtempe ĉeĥa sekcio de IFEF. En la jaro 2011 ĝi organizos en Liberec Internacian Fervojistan Kongreson. La ĉeĥaj esperantistoj daŭre apartenas al la kernaj agantoj ene de IFEF: nun Jindřich Tomášek plenumas la funkcion de ĝia ĉefdelegito, Ladislav Kovář gvidas ĝian fake-aplikan grupon de faka sekcio kaj redaktas *Fervojfakajn Kalendarojn*, Zdeněk Polák kaj Jaroslav Matuška laboras en Terminara komisiono.

Ĉiuj tri asocioj, kvankam jure memstaraj, proksime kunlaboras kun ĈEA. Krom ili ekzistas pluraj neformalaj grupoj de esperantistoj, ĉefe en Prago kaj Brno. Kaj mi kuraĝas ĉi tien envicigi ankaŭ la civitanan societeton „E-lingvo“, kvankam ĝi en la statuto uzas eĉ ne unufoje la terminon „Esperanto“ kaj parolas pri „eŭrolingvo“, tamen ĝia celo, nome eblo de internacia interkompreniĝo helpe de neutrala (do ne-nacia) lingvo, kongruas kun tiu de la Esperanto-movado.

La muzeo de Esperanto en Svitavy estas mastrumata de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, sed mi dediĉas al ĝi specifan lokon, ĉar temas ja pri elstara ekstermovada afero, kiu tre bone servas al la plej bezonata ago: disvastigado de informoj pri la historio, sed ankaŭ pri la nuna stato kaj ebloj de la internacia lingvo Esperanto. Ĝi estas lokita en la Ottendorfer-biblioteko, unu el la plej belaj historiaj domoj en Svitavy, kaj ĝi bone kunlaboras ne nur kun la posedanto de la domo (la urbo Svitavy pere de la urbaj muzeo kaj galerio) sed ankaŭ kun la urba muzeo en Česká Třebová, kiu posedas riĉan Esperanto-kolekton, sed ne disponas pri ekspozici-

cioje. Cetere, la plej admirata eksponaĵo en la Esperanto-muzeo Svitavy, nome la busto de L. L. Zamenhof, estas pruntedonita tien el Česká Třebová. Ankaŭ kun la ceteraj Esperanto-muzeoj kaj bibliotekoj en la mondo ĝi estas en bonaj rilatoj.

La Esperanto-muzeo ne estas nura deponejo kaj ekspoziciejo de Esperanto-antikvaĵoj, sed ĝi strebas esti viva edukejo, danke al la riĉa Esperanto-biblioteko, danke al komputilo por esploroj ekipita per utilaj datenoj (inter alie per granda elektronika Esperanto-ĉeĥa kaj ĉeĥa-Esperanto vortaro) kaj danke al plurkomunikila inform-panelo kun tuŝkrano servanta ĉefe por vizitantoj.

Fine de la prezento de Ĉeĥa Esperanto-Movado mi nomu la ĉeĥajn reprezentantojn en internaciaj Esperanto-organizaĵoj. Krom tiuj pli supre menciitaj en UEA, TEJO kaj IFEF, Miloslav Šváček, prezidanto de Katolika sekcio de ĈEA, plenumas jam en dua elekto periodo funkcion de prezidanto de IKUE kaj Pavel Polnický, prezidanto de Kristana sekcio de ĈEA funkcion de sekretario de KELI.

Petro Chrdle

Nova ekspozicio en Esperanto-muzeo preparata

En Svitavy estas Esperanto-muzeo kun daŭra ekspozicio pri la Esperanto-movado kaj ties historio, kaj krom ĝi ankaŭ portempa ekspozicio. Tiu dua momente prezentas la verkon de la ĉeĥa humoristo, desegnisto, ilustristo kaj esperantisto Pavel Rak. Ĝi daŭros ĝis majo 2011.

Do jam nun ni kolektas materialojn por la sekvanta portempa ekspozicio, kies temo estos „Esperanto kaj spiritalaj tradicioj de la mondo“. Se vi posedas iujn materialojn pri religioj aŭ filozofioj kaj iliaj rilatoj al Esperanto, ni tre petas vin pri la kontribuo al tiu ekspozicio. Viajn objektojn vi povas donaci al la muzeo aŭ pruntedoni, tamen bonvolu kalkuli kun tio, ke la ekspozicio daŭros 12 monatojn ĝis majo 2012. Objekton konvenan por ekspozicio, kiun vi pretus pruntedoni, bonvolu ne tuj sendi al la muzeo, sed unue nur priskribi (laŭeble kun fotografiaĵo), por ke la muzea grupo povu

unue prijuĝi, ĉu ĝi vere povos esti uzata por la ekspozicio. Antaŭdankon al ĉiuj, kiuj helpas, ke la ekspozicio estu kiom eble plej informriĉa kaj samtempe estetike bela. Info: [dvor.libuse\(ce\)seznam.cz](mailto:dvor.libuse(ce)seznam.cz)

el: ĈEA-retkomunikoj

Novajoj de KAVA-PECH

Aldone al la pli supra artikolo jen kompletigo pri la plej freŝaj aktivecoj de Kongresa kaj Kleriga Agentejo de Petro Chrdle kaj samnoma eldonejo KAVA-PECH. Ĝi apud la ĉeĥa, angla kaj germana lingvoj uzas pro profesiaj celoj samrajte ankaŭ Esperanton. Ĝi vigle aktivis ankaŭ por esperantistoj, kaj inter pli ol 130 libroj sub la propra ISBN eldonis 57 en Esperanto. Krome ĝi produktas librojn laŭmende por klientoj el pluraj landoj (Francio, Germanio, Hispanio, Nederlando, Svedio, Koreio) inter ili ankaŭ librojn en Esperanto.

En la eldoneja fakto: En la lasta jaro KAVA-PECH eldonis malpli da titoloj, ol ĝi kutimis antaŭe. La kialo estas, ke la libroj dum la lastaj jaroj eĉ pli malbone vendiĝas ol antaŭe (kio validas ne nur pri Esperanto, sed ankaŭ pri tiuj en la ĉeĥa, kiuj devus doni profiton por ebligi eldonadon ankaŭ en Esperanto). Do de post la komuna Germana-Franca kongreso, kie mi prezentis plurajn novaĵojn, ĝi eldonis eĉ ne unu novan libron en Esperanto.

La librojn, ne nur la tie prezentitajn, eblas trovi ĉe www.kava-pech.cz/esperanto. Ĉiuj estas haveblaj ankaŭ en la GEA-libroservo www.esperanto-buchversand.de

Momente estas preparataj por la eldono jenaj tri novaĵoj: Kvinlingva „Ekoturisma vortareto“ ekestis en la internacia kunlaboro de Zdeněk Pluhař (ĉefaŭtoro kaj respondeculo pri la Esperanta kaj ĉeĥa partoj), Manfred Westermayer (germana), Christopher Fettes (angla) kaj Raymond Skilling (franca). Ĝia bezono ekestis dum Ekoturismaj renkontiĝoj. Ĝi estas redakte preta. Momente efektiviĝas la antaŭpresa laboro.

En la etapo de provlegado kaj desegno de ilustraĵoj troviĝas la klasika sciencfikcia dramo de Karel Čapek „R.U.R.“. Ĝi

aperos en luksa formo kun ilustraĵoj de Miroslava Tomečková.

Mi mem preparas la trian eldonon de la verketo „Profesia uzo de Esperanto kaj ĝiaj specifaj trajtoj“. De la dua eldono jam pasis 15 jaroj kaj la situacio multe ŝanĝiĝis, tial ĝi estos funde tralaborita kaj unuafoje la teksto akompanata per ilustraĵoj. Ĝi ankoraŭ ne estas redakte preta, sed mi antaŭvidas ĝian eldonon iam en la unua duono de la jaro 2011.



En turisma fakto: Kiel profesia vojaĝagentejo KAVA-PECH okupiĝas precipe pri akcepta turismo, do servo al turistoj venantaj al Ĉeĥio. Ankaŭ esperantistoj ofte uzas la okazon tranokti pere de ĝi ekzemple en Prago pli favore ol mendante la samon rekte de la hoteloj. Sed por esperantistoj la agado estas pli vasta.

La plej proksima aranĝo, en aprilo 2011, estos flugkaravano al Ĉinio lige al la Internacia Esperanto-Konferenco de OSIEK en Wuhan kun la temo „La Ĉina Saĝo“, kun riĉa turisma programo (Ŝanhajo, la ĉarma naturo ĉirkaŭ la Longa Rivero kun konuso-aspektaj montetoj (vidu foton), terasformaj rizaj kampoj kaj eblo konatiĝi kun la fiŝkaptado helpe de kormoranoj, Honkongo.

En septembro okazos la tradicia EKO-TUR (Ekoturisma renkontiĝo por biciklantoj kaj piedturistoj kun komunaj vesperaj programoj), ĉi-foje en Bohemia Karsto kaj montetaro Brdy najbare de Prago.

En julio 2012 KAVA-PECH organizos en Svitavy (sidejo de Ĉeĥa Esperanto-muzeo) por OSIEK Internacian Esperanto-Konferencon kun la temo „Sciencfikcio kaj robotoj“. Pli da informoj estas troveblaj ĉe www.kava-pech.cz/esperanto aŭ ĉe mi:

Petro Chrdle, Anglická 878, CZ-252 29 Dobřichovice, chrdle@kava-pech.cz

Theorie und Praxis Interkultureller Monat in Erlangen

Erlangen • Wie in jedem Jahr, so lud auch im Oktober 2010 der Ausländerbeirat von Erlangen zum „Interkulturellen Monat“. Im Rahmen dieser Veranstaltung bot sich verschiedenen Organisationen, Vereinen und Klubs



Paola Giommoni. Foto: Bernhard Maurer

die Möglichkeit, sich mit einem eigenen Beitrag im Rahmen des Themas „Miteinander leben in Erlangen“ zu präsentieren und somit die friedliche Kommunikation zwischen verschiedenen Sprachen und Kulturen zu fördern. Die Esperanto-Gruppe Erlangen nutzte diese Chance und lud am 6.10. zu einem Informationsabend in der Gaststätte „Orpheus“, dem Stammlokal der Erlanger Esperantisten; Initiator war hier Bernhard Maurer, Erlangen.

Der Abend verlief zweigeteilt: Zunächst referierte Bernd Krause, der Landesvorsitzende der Bayerischen Esperanto-Liga (BELO), zum Thema „Esperanto – 16 Regeln = 1 Sprache“ über die Grundlagen und Vorzüge von Esperanto. Diesem theoretischen Teil schloss sich dann ein praktischer an, denn den bayerischen Esperantisten war es gelungen, für diesen Abend die italienische Kollegin Paola Giommoni zu gewinnen. Sie befand sich zu dieser Zeit auf einer Vortragsreise durch Deutschland und hatte auch bereits in anderen Städten interessante Vorträge gehalten, darunter auch am 27.9. in München. Dort referierte sie vor ca. 25 Zuhörern über die Bildmotive der ita-

lienischen Euro-Münzen, in Erlangen hingegen war Italien als Ganzes das Thema. Hier gelang es s-ino Giommoni auf humorvolle Weise, alle Anwesenden in kurze Gespräche zu binden, in denen, selbstverständlich auf Esperanto, vor allem über Urlaubserfahrungen im „Stiefel“ und die Besonderheiten der italienischen Kultur geplaudert wurde. Erstaunlicherweise – und das konnten alle Teilnehmer als positive Erfahrung mit nach Hause nehmen – gelang es auch den anwesenden Nicht-Esperantisten weitgehend, den mit Witz und Charme gespickten Ausführungen Paolas zu folgen, mehr noch: sich sogar mit einfachem Vokabular verständlich zu machen. Der Abend war somit nicht nur eine Demonstration internationaler Freundschaft, sondern zugleich ein eindrücklicher Beweis dafür, dass Esperanto ein äußerst nützliches und zugleich leicht erlernbares Instrument der Verständigung ist – besser Werbung kann es wohl kaum geben.

Bernd Krause

Auf den Spuren jüdischer Kultur

Forchheim • Nicht, wie in den vergangenen Jahren, zu einer Wanderung in der Region lud die Esperantogruppe Forchheim, sondern zu einer Veranstaltung, die in ihrer Thematik gewissermaßen auf Umwegen Bezug zu Esperanto hatte: zu einer Besichtigung des jüdischen Friedhofs im benachbarten Baiersdorf. Hier fand am 17. Oktober (Sonntag) im Rahmen des Begleitprogramms zur Ausstellung „Schalom und Schabbat – Jüdisches Leben aus unserer Mitte“, die im Pfalzmuseum Forchheim bis zum 31. Oktober zu sehen war, eine Führung statt. Die Forchheimer Esperantisten unter der Leitung von Evelin Geist nutzten diese Veranstaltung, um etwas über die jüdische Kultur zu erfahren, jene Kultur, der Ludwik Zamenhof entstammte.

Geführt wurde die Teilnehmergruppe von Dr. Rajaa Nadler vom „Zweckverband Synagoge Ermreuth“, Gemeinde Neunkirchen am Brand. Sachkundig wusste Frau Dr. Nadler über Riten und Gebräuche der Juden zu berichten, und

auch die Geschichte des Baiersdorfer Friedhofs selbst wurde eingehend beleuchtet. Der mitten im Ort, nahe dem Standort der nicht erhaltenen Synagoge gelegene Begräbnisplatz beherbergt mehr als 1.000 Grabsteine aus den Jahren 1684 bis 1937. Umgeben von einer Steinmauer, stellt er nicht nur einen Ort der Ruhe dar, sondern liefert zugleich Zeugnis von den nicht immer auf den ersten Blick erklärlichen Besonderheiten jüdischer Bräuche und Riten. Frau Nadler konnte den Besuchern jedoch Vieles näher bringen und erklären, so etwa auch den durchaus bekannten, auf dem Baiersdorfer Friedhof jedoch wenig gepflegten Brauch, Steine zum Gedenken an die Verstorbenen auf den Grabstein zu legen. Diese Steine erfüllten nämlich ursprünglich insofern eine Schutzfunktion, als sie den Verstorbenen vor dem Zugriff durch wilde Tiere schützen sollten, indem sie den Leichnam vollständig bedeckten. Des Weiteren unterstützten sie symbolisch das Verschwinden des Grabsteines, der im Lauf der Jahrhunderte immer tiefer in den Boden sinken sollte. Auch über den Symbolgehalt der bildlichen Darstellungen und die Inschriften in hebräischer und (seit dem Beginn des 19. Jahrhunderts zusätzlich zwingend vorgeschriebener) deutscher Sprache erfuhren die Teilnehmer der Führung interessante Details, so etwa die aus nicht-jüdischer Sicht ungewöhnliche Sitte der doppelten Namenführung: Neben dem bürgerlichen Namen führte der Jude als Mitglied der Gemeinde nämlich einen zweiten, sozusagen rituellen Namen, dessen Anfangsbuchstabe mit demjenigen des Vaters übereinstimmte. Wer des Hebräischen mächtig ist, kann dies anhand der Inschriften auf den Grabsteinen überprüfen, ebenso die Datumsangaben, die in Form von punktierten Buchstaben das Sterbedatum wiedergeben.

Nach der knapp zweistündigen Führung trafen sich die Mitglieder der Gruppe dann noch bei Kaffee und Kuchen und ließen den interessanten Nachmittag mit angeregter Unterhaltung ausklingen.

Bernd Krause

Internacia Kongresa Universitato (IKU) invitas prelegontojn

Dum la 96-a UK en Kopenhago okazos la 63-a sesio de IKU. UEA invitas universitatajn profesorojn, docentojn kaj personojn kun simila kvalifiko sendi proponojn de prelegoj al la sekretario de IKU. Pliaj detaloj kaj antaŭaj IKU-prelegoj kaj -resumoj troviĝas en la IKU-paĝo uea.org/dokumentoj/IKU.

Kia estas la stato de la Esperanto-movado en Hungario?

Demandis Eŭropa Bulteno kaj F. Harnyos (vicprezidanto de HEA) respondis: „En nia lando multe da gejunuloj lernas la internacian lingvon, ĉirkaŭ 5000 personoj jare. Konsidere al nombroj de la ekzamenitoj Esperanto havas la 3-an lokon – rekte post la angla kaj la germana – ĉe Fremdlingva Kleriga Centro... Oni devas havi ŝtate rekonitan, mezgradan lingvo-ekzamenon pri iu fremdlingvo por akiri altlernejan aŭ universitatan diplomon. Ni tre malfacile lernas fremdajn lingvojn, pro tio multaj elektas Esperanton. Bedaŭrinde nur kelkaj estas movademaj, do la plimulto ne okupiĝas pri la lingvo post la ekzameno. Kompreneble ekzistas ankaŭ avantaĝo, ĉar tiel amase oni konatiĝas kun Esperanto, kaj multaj el ili iam ajn en la estonteco povos iĝi Esperanto-parolantoj“. Alia parto de la artikolo temas pri la asocia vivo en Hungario. (Eŭropa Bulteno 09/2010)

Esperanto al Ameriko

La Amerika Komisiono de UEA venigis al la kongresoj en Kubo homojn el amerikaj landoj. La gastoj spertiĝis kaj nun komencas fortigi la movadon en siaj landoj. En la monatoj antaŭ la kongresoj Martin Schäffer vojaĝis al Nikaragvo, prelegis pri Esperanto kaj instruis ĝin. Amerika Komisiono kreis entute 7 retpaĝojn por diversaj landoj kaj nun okupiĝas pri rondvojaĝo de belga esperantisto al latinamerikaj landoj, daŭra evoluo de Esperanto en Meksiko per instruado ankaŭ en aliaj universitatoj, enkonduko de Esperanto en universitaton de Nikaragvo, informado per retaj anoncoj. (Yahoo-grupo „esper-german“)

Diplomlaboraĵoj pri aŭ en Esperanto

Retejo www.edukado.net informas, ke aperis tutnovaj funkcioj kaj servoj. Unu el la plej gravaj novaĵoj estas la lanĉo de la sekcio „Diplomlaboraĵoj“. La celo estas kolekti informojn pri la sciencaj verkoj, kiujn oni faris je studfina periodo pri esperantologiaj aŭ interlingvistikaj temoj en Esperanto aŭ en alia lingvo. (Katalin Kováts)

Belartaj konkursoj de UEA en 2011

Tiu gvida Esperanta artkonkurso invitas partoprenantojn por la 62-a fojo. La rezultojn oni anoncos en la 96-a Universala Kongreso en Kopenhago. Partopreno estas libera al ĉiuj kaj ne ligita al partopreno en la UK nek al membreco en UEA. Detala regularo haveblas ĉe UEA kaj legeblas ankaŭ ĉe uea.org/dokumentoj/belartaj_konkursoj_regularo.html.

100 plej legindaj tradukoj

En la novembro numero de la revuo Esperanto aperis listo de 100 „plej legindaj tradukoj“. Eble la plej konata inter ili estas „La grafo de Monte-Kristo“ de A. Dumas, kiun la revuo nomas „romanego plena de intrigoj, perfidoj, murdoj kaj venĝoj“. „Sagao de Njal“ ne nur apartenas al la 100 plej legindaj tradukoj, krome la islandlingva originalo rangas laŭ la enketo de la Nobel-komitato inter la 100 plej bonaj iam verkitaj. La tradukon faris Baldur Ragnarsson.

John Wells reelektita

kiel prezidanto de la Akademio

43 akademianoj voĉdonis por elekti la estraron kaj la direktorojn de la sekcioj kaj komisionoj de la Akademio de Esperanto. Kiel estraranoj estis elektitaj: John Wells, prezidanto; Probal Dasgupta, vicprezidanto; Brian Moon, vicprezidanto; Renato Corsetti, sekretario. La elekto de estraranoj kaj direktoroj estas daŭrigo de la elekta ciklo, kiu komenciĝis en Aprilo per elekto de 5 novaj akademianoj. El la tiamaj novelektitoj, Alexander Schlafer nun iĝis direktoro de la Lingva Konsultejo. (Libera Folio)

Kiel trovi favoran restadejon dum la Kopenhaga UK 2011

Peter Weide atentigas, ke se oni deziras ricevi konvenan, sed ne tro multekostan restadejon, eble la „lito kaj matenmanĝo“-oferto taŭgas. Oni povus rigardi ekzemple <http://www.copenhagenbedandbreakfast.dk/Copenhagen-KortGB.htm> aŭ <http://www.visitcopenhagen.dk/privatevaerelser/koebenhavn>

Granda fajro en Bona Espero

Ampleksa incendio detruis grandan parton de la teritorio de Bona Espero, esperantista orfejo en Brazilo. En letero sendita al subtenantoj de la projekto, la estroj Giuseppe kaj Ursula Grattapaglia, rakontas kiel ili kontraŭbatalis la fajregon kaj sukcesis savi la konstruaĵojn. Sed 90% de la tuta teritorio de Bona Espero brulis. Alvenis multaj mesaĝoj de solidareco kaj ankaŭ financa helpo – sed ne jam sufiĉe – ekz. por aĉeti novajn, betonajn barilfostojn anstataŭ la forbrulintaj lignaj. (www.liberafolio.org/)

Rim.: 1. Kion faras Bona Espero? http://de.wikipedia.org/wiki/Bona_Espero 2. Ĉu vi volas helpi? Bona Espero havas konton ĉe UEA. Oni povas pagi sian donacon al kiu ajn banka aŭ poŝta konto de UEA. Ekzemple: Universala Esperanto-Asocio / IBAN: DE51370100500318291509 / BIC (SWIFT-Code): PBNKDEFF / Por Bona Espero

D-ro Arthur BAUR forpasis

la 17-an de Septembro en Männedorf, Svislando. Baur (naskiĝis 1915 en Zuriko) estis svisa honora membro de UEA. Li estis elstara verkisto kaj funkciulo de la svisa Esperanto-movado kaj dum pluraj jaroj prezidanto de Svisa Esperanto-Societo. Li gvidis dum 40 jaroj la Esperanto-elsendojn de Svisa Radio Internacia. Por la UK en 1979 li verkis la libron La fenomeno Svislando, per kiu la sperta ĵurnalistino kreis imitindan modelon por similaj priskriboj pri aliaj landoj. En sia lando li konatiĝis ankaŭ pro siaj regule reeldonitaj lernolibroj de la svisgermana (alemana) lingvo kaj de libroj pri la retoromanĉa. (Gazetaraj Komunikoj de UEA)

Projekto *Mozaiko* – nova interreta vikimagazino de interesaĵoj lanĉita

Ĉe <http://www.esperanto.cz>, la retpaĝaro de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, en la rubriko Aktuality (Aktualaĵoj) aperis nova monata revueto *Mozaiko*, kiu estas tempoŝpare bazita plejparte sur ligiloj al artikoloj en Esperanta Vikipedio. Ĝia ĉefa celo estas proponi al esperantistoj, kiuj ankoraŭ ne bone konas la enciklopedion Vikipedio aŭ ankoraŭ iom dubas pri ĝiaj valoro kaj utilo, elekton de legindaĵoj el plej diversaj fakoj. La artikoloj povas esti uzataj ne nur por individua kleriĝado kaj lingva perfektigado sed ankaŭ kiel fonto por preparo de lingvokursoj aŭ por pretigo de prelegoj.

La arkivo de Radio Vatikana kreskadas

Per la daŭra enarkivigo la paĝaro de www.radio-vatikana-esperanto.org/ nun proponas pli ol 900 elsendojn en Esperanto de Radio Vatikana, kiuj estas proks. 20% de ĉiuj iam ajn elsenditaj elsendoj. (Carlo Sarandrea, IKUE)

Verduloj Esperantistaj lanĉis propran filmo-serion

... ĉe la servilo Youtube. La freŝa, las-te aperinta filmeto temas pri ekologia (kaj sana kaj financa) efiko de trinkado de akvo el plastaj boteloj. La filmeto troviĝas ĉe: <http://www.youtube.com/watch?v=p50qM-11CyU>

En Kroatio Esperanto iĝas grava lingvo de turismo

La Turisma asocio de Zagrebo ekigis planon uzi aktive Esperanton en reklamado de turismo kaj en oferto de turismaj allogaĵoj. Tiel la asocio enmetis Esperanton en sian retpaĝaron <http://www.zagreb-touristinfo.hr/>. Ĝi aperigis broŝuron pri Zagrebo en Esperanto kaj planas dissendi informilon pri tio ke la asocio ofertas Esperanto-rapidkurson laŭ la Zagreba Metodo kiel apartan novaĵon por turistoj kiuj pretas ankaŭ lerni ion novan kaj kontakti lokulojn senpere. (Z. Tišljarić, Eŭropa Bulteno 09/2010)

Nova redaktoro de *Kontakto*

TEJO anoncis, ke la nova redaktoro de *Kontakto* dum la venontaj 2 jaroj estas Rogener Pavinski. Rogener estas brazilano, filmisto, kunkreinto de la DVD „*Esperanto estas*“, muzikisto i.a. voĉo de Supernova, kaj eksa estrarano de TEJO. Rogener Pavinski: „Mi multe dankas la konfidon ... Ni strebos doni novan vivon al la revuo, labori por ke ĝi estu pli alloga, kultura kaj freŝtema. Ni planas multajn novaĵojn kaj invitas la esperantistojn partopreni en la kreado de tiu nova *Kontakto*“.

Urba retejo de Taragono ankaŭ en Esperanto

La retejo de Taragono (Tarragona en hispana kaj kataluna lingvoj), ĉefurbo de samnoma provinco prezentas sian kandidatiĝon al Kultura Ĉefurbo de Eŭropo en diversaj lingvoj, ankaŭ en Esperanto. (www.tarragona2016.org/presentacio/prezento)

kolektis kaj prilaboris
Uwe Stecher

Esperanta kastelo Greziljono enketas

Bonvolu repondi kelkajn demandojn por orienti la agadojn de Esperanta kastelo Greziljono. (En Esperanto: <http://gresillon.org/spip.php?rubrique19&lang=eo>, en la germana: <http://gresillon.org/spip.php?rubrique19&lang=de>. Se vi ne konas Greziljonon, bv. klaki tien: <http://gresillon.org>. Dankon anticipan.

Esperanto-Kulturdomo
Kastelo Greziljono

Gaja vortaro por komencantoj

En la manoj teni *Konversacian Vortaron* de Andreo Cseh signifas senti la pasintcon de la Esperanto-movado, ties evoluon ĝis la nuna momento kaj la bazon por plu profundigi siajn sciojn en la lingvoposedo, disvastigi la vidhorizonton per la apliko de Esperanto.

Temas pri vortaro el 1930, kiun Cseh kompilis tiam per la vortoj, uzataj en siaj famaj Ĉe-metodaj kursoj. Nun Internacia Esperanto-Instituto en Hago prizorgis la 6-an eldonon, tute modernigitan per no-

vaj elementoj, sed kun singarda konservo de la “antikva” materialo. Pasis 80 jaroj, sed la aktualeco de la leksikono restis samalta. Ĝia originaleco allogas kaj ankaŭ la ŝercaj kaj spritaj klarigoj, kiuj proksimas laŭ pensmaniero al la ĉi-tempa junularo.

Konversacia Vortaro entenas 479 difinojn, priskribitajn fare de la lernantoj de Cseh kaj 134 novajn de aliaj lernantoj el la lastaj jardekoj. Tiujn ĉi kolektis Ĉe-instruistoj el la pli junaj generacioj. Per la freŝa aldona stoko la leganto konstatas la pliglobigon de la Ĉe-kursoj. Aperas nun ekzemple ankaŭ vortoj el kontinentoj ekster Eŭropo kiel vulkano, rizo, pingveno. Plejparte ambaŭ grupoj estas humurplena kaj tial ili facile legiĝas. Viveco estas la fundamento de la vortformuloj sendepende de la tempo. Jen du ekzemploj: amas = la plej bela, grava kaj interesa vorto; televidilo = aparato, kiu montras skandalojn. Aliflanke la interesaj difinoj ofte pensigas pri nia vivo, ĝia senco kaj ties valoroj. Jen du ekzemploj: homo = la plej inteligenta kaj grava dupieda besto; ĝentila = parolas elegante, diras belajn (neverajn) vortojn. La sesa eldono de *Konversacia Vortaro* estas unika, ĉar neniam antaŭe ĝi aspektis tiel bele. Moderna, impresa volumo de 111 paĝoj. La dimensioj estas trafe elektitaj por la okuloj. Ili longe ne laciĝas ilin kaj kune kun la ridigaj klarigoj instigas plu legi. La nova formato, 10,5 x 18 cm, daŭre ebligas, porti ĝin en la poŝo. Almenaŭ junuloj konforme al la hodiaŭa homo havas grandajn poŝojn.

Rimarkebla estas la iniciato pri enmeto de kvindek desegnoj. La humuraj bildoj sur la maldekstraj paĝoj, adaptitaj al la vortoj sur la dekstraj paĝoj, spiras egalan spiriton kiel la difinoj kaj sekve elvokas tiun gajan senton, tiel karakteriza dum vera Ĉe-leciono. Entute leĝera libro, utila por Ĉe-instruistoj, komencantoj kaj ĝuebla por lingvo-ludemuloj, historiistoj kaj desegno-ŝatantoj.

Por plu utiligi la vortaron estas konsilinde, aperigi ĝin en interreto.

Volodimir Hordijenko, Kievo
diplomita Ĉe-instruisto

Andreo Cseh, *Konversacia Vortaro*, Eldonis IEI Hago, Prezo 13 eŭroj.